

LINGVO INTERNACIA

GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA JE LA NOMO DE L' KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por la jaro 1899:

Skandinavaj kronoj 2,00 = germanaj markoj 2,25 = frankoj 3,00 = rubloj 1,00 = portugalaj rejsoj 500 = brazilaj rejsoj 1000 = aŭstro-hungaraj kronoj 2,75 = cendoj 60 = ŝilingoj $2\frac{3}{12}$.

Pago por anoncoj:

15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio. 10 % rabato por duonjaraj, 25 % rab. por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: *Paul Nylén, Upsala, Sverige* (Svedujo).

Adreso de la administrado: *Ekspedejo de Lingvo Internacia, Luleå, Sverige* (Svedujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro.

Pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la Ekspedejo.

N:o 3 (39)

la 5:an de septembro 1899

IV:a jaro.

Al la rusaj esperantistoj.

Kun ĉiam pli kreskanta intereso la mondo rigardas unu el la plej grandiozaj fenomenoj de tiu ĉi centjaro: la intensivajn kaj ekstensivajn efikadojn, kiuj en la granda rusa regno elvolviĝadas por la pliperfektigado de la materialaj komunikiloj.

Tiu ĉi moviĝado portas en si ĝermon de ekonomia progresado ne sole interne, sed malproksimen ekster la rusa regno. Tiun ĉi ĝojigan fakton ankaŭ observis la eksterrusaj popoloj kaj ili sin mobilizadas por almiliti al si laŭ la paca vojo de komerco novan interesosferon interne la limoj de la rusa lando estonteca. Ankaŭ tie ĉi en Svedujo oni antaŭpreparas entreprenojn, kies celo estas tiradi unu parton de la rusa transokcidenta komerco al kaj trans nia lando kaj plifaciligi elporton de niaj industriproduktoj, speciale tiaj de fero, kaj ilia disvendado en la malproksiman vastegan orienton.

La fundkondiĉo de elportkomerco konsistas en intima konateco kun la lingvaj, komercaj, financaj kaj interkomunikilaj rilatoj en la regiono enporta, la sociala kaj politika formiĝado de l' lando — per aliaj vortoj: intima kaj preciza konateco pri tiu lando, al kiu oni volas elportadi, prezentas unu el la plej gravaj kondiĉoj de prosperebla elportado. Tia scio estas, kompreneble, akirebla plej intime per sintrovado en la koncerna lando kaj per ellernado de ĝia lingvo; sed kiomaj havas eblon akiri al si tiun ĉi scion? Kaj kion fari pri aliaj landoj? La naciekonomia problemo tamen konsistas en tio ke *ĉiu naciano* atingu la eble plej multnombrajn okazojn elŝanĝi siajn servojn al tiaj de aliaj homoj. Ju pli viva, rekta reciprokefikado, des pli bone!

Ke povas esti eĉ danĝera por homo entrepreni komercajn farojn en lando, kies socialajn instituciojn li ne konas, mi montros per ekzemplo el la ĉi tiea juĝejo polica, kie mi deĵoris tagon antaŭ kelka tempo. Kvin rusaj regnantoj — ŝajne neriĉaj, honestaj viroj kun kompleza vidiĝo — estis velintaj tien ĉi

(el Baltiŝport mi kredas) kun terpomoj, kiujn ili, nesciante niajn komercajn regularojn, senceremonie disvendis el siaj barkoj en la haveno. La sekvoj de tiu ĉi nesciado montriĝis fatalaj: ĉirkaŭe 1500 kronojn ili estis juĝitaj punpagi kune!

Nu, tie ĉi ni esperantistoj havas okazon la plej bonan fari demonstracion por nia kara lingvo kaj montri al la mondo ion, unue al la komerca mondo kaj poste al la cetera, kiel potenca efektive estas esperanto. Mi permesas al mi proponi modestan komencon. Humile mi petas vin, ke vi sciigu al viaj konataj komercistoj kaj industriistoj, kiuj eble dezirus efektivi komercajn alligojn kun tiaj personoj en mia hejmlando kaj precipe en Stokholmo, sed pro nesciado pri nia lingvo kaj niaj rilatoj ne povas ĝin efektivi, ke *mi estas volonta ĉiel ilin helpi* koncerne tiujn ĉi aferojn. Tiel mi volas liveradi al ili adresojn de ĉitiejaj eminentaj personoj en dezirataj branĉoj profesiaj, skribe, aŭ, se la koncernaj personoj loĝas en Stokholmo, buŝe plenumi la komisionj eventuale alkonfidotajn al mi, retransigi al miaj eksterlandaj klientoj la respondojn de tiuj miaj svedaj kiel ankaŭ aliajn deziratajn sciigojn kaj informojn en esperanto, prizorgi esperanta-svedan tradukon de anoncoj kaj ilian enpresigon en niaj plej konvenaj gazetoj, per unu vorto: mi volas per ĉiuj miaj fortoj agadi tiel, ke la intencoj de miaj klientoj, ekstersvedaj kaj svedaj, estu efektivigotaj kiel eble plej kontentige al ili.

Estas eble aldoninda, ke mi jam elverkis cirkuleron, per kiu mi informas la plej eminentajn Stokholmajn komercistojn kaj fabrikistojn pri tiu ĉi afero kaj promesas al ili ĉian bezoneblan helpon.

Mi estas konvinkita ke, se ni nur estos ekperigintaj komencon de ia komerca alligo, la koncernaj personoj post mallonga tempo mem estos senpere intertraktantaj siajn negocojn kaj tiel atingos la veran komprenon pri la povo de nia lingvo forigi la grandajn ŝtonojn, kiujn la diverslingveco ruladas sur la vojon de iliaj internaciaj spirita komunikigoj.

La demando de internacia lingvo estas problemo postulanta sian solvon, sed ĝi estas solvebla ne per teorio, ne per potenco de ia sorĉa vergo, sed iom post iom per atenta observado al bezonoj, progresoj kaj fortoj. Oni konfesinde ne estu tro sangvinika pri tio ĉi, sed senmotiva neespero koncerne prosperajn rezultatojn de niaj laboroj prezentas en si mem malkonservon de eblaĵoj ekzistantaj.

Ni devas konsideri la esperantismon kiel prefere *praktikan penadon* kaj ne starigu antaŭ ni pli altajn celojn ol tiuj, kiuj estas atingeblaj kun la reala fundo sub la piedoj. Do estas ankaŭ nature ke ni masonas la fundamenton de la progresoj de Esperanto per *materialaj* fruktoportaj interkomunikigoj. Nova artikolo per tio estas almetata al la pli fruaj penadoj, kies celo estas akceladi la komunajn por ĉiuj popoloj kulturajn kaj ekonomiajn interesojn neniel celante al ia ajn politika celo.

La movilo de nia komuna vivo estas monakiro; la ĉefdio ĉitempa estas Utilo. Se ni estas iom ekkonvinkigintaj la praktikan komercan mondon pri la utilo de Esperanto, la tutmondo ankaŭ estos nia. Tiu estas mia opinio, kaj mi petas ĉiujn esperantistojn, kiuj interkonsentas kun mi en tiu ĉi demando, ke ili volu alpaŝi agon, kaj alpaŝi agon tuj, ne sinkofindantaj al la — tempo, tiu lasta rifuĝo de la dubo kaj nedecidemeco!

Kun internacia saluto. Estimege

P. Ahlberg.

Sekretario de Klubo Esperantista
en Stockholm, Svedujo.

Novajoj.

Societo por la propagando de Esperanto. — Kunsido de l' Komitato.

La 23:an de julio, en dimanĉo, la Komitato de l' *Societo por la propagando de Esperanto* kunvenis Parizon kaj kunsidis en la loĝejo de sia vic-prezidanto. Alestis s-roj L. de Beaufront, Henri Hamel, René Lemaire.

Ricevinte komunikon pri ĉiuj dokumentoj koncernantaj la kunsidon, s-roj Bel, Blanjean, Démarest kaj Roux esprimis sian opinion kaj voĉdonis per korespondo.

1:e. La raporto pri la antaŭa kunsido kaŭzas nenian rimarkon kaj estas aprobata.

2:e. Situacio buĝeta, la 20:an de julio 1899: (la ciferojn ni preteriras).

3:e. Por doni sekvon al la ideo prezentita de s-ro Démarest en la lasta kunveno, s-roj de Beaufront kaj Lemaire proponas al la Komitato la fondon de *Atesto pri Kapableco* koncerne Esperanton kaj prezentas samtempe projekton de *Regularo*.

S-ro Blanjean, kvankam li ne estas principe kontraŭa al tiu fondo, timas ke la diplomoj altiros mokojn, kaj ke tiu ĉi fondo estus iom antaŭtempa; ĝis nun la instruistoj pri Esperanto ne estas tiel multaj, ke ili bezonas esti rekomendataj al la publiko per diplomo, kiu kredeble ne altiros al ili multe pli da ŝato.

Al tiuj observoj oni povas respondi per la konsideroj sekvantaj, kiuj ŝajnis decidigaj al la ceteraj membroj de la Komitato: la karaktero serioza de la provoj, la titolo tiel modesta *Atesto pri Kapableco*, kiun ni intence elektis prefere ol *Diplomo*, la malesto de ĉiu bruega reklamo montras bone ke ni neniel volas ekspluati la homan vanitecon, kaj permesas al ni esperi, ne ke nia *Atesto pri Kapableco* evitos ĉiun kritikon kaj ĉiun mokon — ĉar oni povas ĉiam moki kaj kritiki, — sed ke tiuj atakoj kaj ŝercoj ne havos pli da graveco ol tiuj pri kiuj ni de longe kutimis. Ĉu do ni devas, pro malutiloj kiuj ŝajnas malmulte danĝeraj, forlasi la seriozajn utilojn kiujn havus la fondaĵo proponita?

Unuaparte, efektive, la *Atesto pri Kapableco* servos, ne precipe por altiri pli da ŝato al la instruistoj kiuj ĝin posedos, sed por limigi en tiuj ĉi solaj la respondecon de la *S. p. p. Esperanto*. Tiu singardo ne ŝajnas ĝis nun necesa; sed, pro la disvastigado de nia afero, ĝi kredeble fariĝos baldaŭ tia. Estas eble ke kursoj, grupoj iaj estos aranĝataj tute sen la inspiro kaj la konsiloj de la Societo. La Societo ne pretendas al ili malhelpi nek ilin kondamni absolute. Sed almenaŭ, se ia tiuspeca instituto enportus praktikojn ne korektajn, produktus nebonajn rezultatojn ekspluateblajn kiel argumentojn kontraŭ *Esperanto* mem, ĝi povus tute formeti pri ili sian respondecon kaj kontraŭprezenti la bonajn rezultatojn akiritajn sub sia oficiala direktado aŭ inspiro. — Duaparte — kaj tio estas punkto almenaŭ egale interesa, — la *Atesto pri Kapableco* incitos la adeptojn lernadi pli serioze Esperanton, proponante al iliaj penoj difinitan celon. S-ro Hamel pri tio citas la bonegajn rezultatojn produktitajn de la diplomoj Stenografaj.

Ni aldonu ke D-ro Zamenhof, kies ŝatindajn konsilojn ni uzas pri ĉiu grava afero, respondis per tiuj vortoj: “Via ideo estas laŭ mia opinio tre bona; mi ne sole ĝin plene aprobas, sed mi jam mem volis proponi al vi aranĝi ion similan.”

Ĉar s-ro Blanjean diris ke li aliĝos al la opinio de siaj kolegoj, la Komitato decidis la kreon de la *Atesto pri Kapableco* kaj fiksas la tekston de l' *Regularo*, kiu estas presita en l' *Espérantiste*.

4:e. La Komitato, unuvoĉe, decidis malfermi *Konkurson Literaturan*. Ĝia regularo estas same presita en la ĵurnalo. La Komitato esperas ke multaj konkursantoj partoprenos en ĝi.


5:e. La *Nomaroj de Societanoj* presataj ĉiumonate en l' *Espérantiste* nun kovras multe da loko kaj estas malmulte oportunaj por serĉoj. — La Komitato decidis publikigi en la fino de ĉia jaro, komencante de tiu ĉi jaro, *Jaradresaron* plenan, enhavantan la nomojn kaj adresojn de ĉiuj Societanoj de la jaro, klasitaj laŭ la kategorioj, laŭ la landoj kaj laŭ la alfabeto ordo. Dank' al tio, l' *Espérantiste* nur devos publikigi la novajn aliĝojn, la eliĝojn, la ŝanĝojn de kategorio aŭ adreso okazontajn inter la eldonoj de la jaradresaro. — La *Jaradresaro* estos sendata senpage al ĉiuj Societanoj.

La sekretario: René Lemaire.

* * *

Ankoraŭ unu.

Nia kolego "*l'Espérantiste*" sciigas al ni, ke unu persono franca dissendas libron, kiun li verkis pri nova mondlingvo, la "Lingvo Blua". Tiu "lingvo" ne estas ankoraŭ preta — kaj sendube neniam estos —, ĝi estas simila al la aliaj centoj da projektoj, kiuj aperas hodiaŭ kaj malaperas morgaŭ. Sed se ĝi mem ne estas rimarkinda, la maniero de l' aŭtoro de la dirita libro estas tamen tre stranga: li sendis sian libron al diversaj personoj, inter ili esperantistoj, ekzemple s-ro de Beaufront, kaj tiujn ĉi personojn havantajn la libron li kalkulas kiel *membrojn-aliĝintojn*, kaj havas la intencan publikigi ilian nomaron. S-ro de Beaufront protestis kontraŭ tiu maniero per artikolo en "*Le Petit Bleu*" brusela de la 13:a de aŭgusto.



La antaŭdirantino de tertremo.

Fakto.

En Oktobro de 1893 jaro, mi laŭ aferoj de l'ofico veturis Asĥabadon, ĉefan urbon de l' Postkaspia provinco.

En unu el trankvilaj, varmaj vesperoj — en tiu ĉi tempo en provinco oni portas ankoraŭ la someran vestaĵon, — mi kun kelkaj kolegoj sidis ĉe nia komuna amiko s-ro L. La fenestroj kaj pordoj de l' malgranda ĉambro de l' domo estis tute malfermitaj. Malgranda vento eniris en ilin kaj facile balancadis la flamon de l' kandeloj sur karta tablo kaj devigis iafaje ekflami lampon-fulmon, pendantan super ronda tablo, kie afable bruis kaj kvazaŭ bonanime koleris ion la temaŝino. Plena luno per sia delikata lumo ekrigardis la fenestrojn, kaj longa luma strio de ĝi tratiris sin tra la tuta ĉambro kaj sin kaŝis en malfermita pordo de l' alia. Sur unu duono de unu el la pordoj, kuntiriĝinte, trankvile dormis malgraŭ laŭta parolado kaj lumo en la ĉambro, malsovaĝa pigo de l' s-ro L., la objekto de lia aparta amo kaj zorgo.

Estis jam, por Asĥabado, sufiĉe malfrue, — h. 10—11 de l' vespero. La bruo en la negranda urbo iom post iom ektrankviliĝis, kaj tien ĉi sur finon de l' urbo, unu el plej malproksimigitaj stratoj, apenaŭ aŭdeble, nur malofte alportiĝis ĝiaj desonoj, rompantaj trankvilan, solenan nokton.

Kvaro el ni longe bataladis sur la verda kampo. La cetera do kompanio trankvile paroladis pri la "lando hejma" de kie per sorto ni estis forĵetitaj en sablojn de l' Mez-Azio. Ĉio iris je sia ordo, subite... trankvile dorminta la pigo furioze deflugas de l' pordo kaj kun trapikaj, l' animon disŝirantaj kriegoj komencis ĉirkaŭskribi koncentrajn rondojn ĉirkaŭ la lampo.

— Kio tio ĉi estas kun ĝi? — ekmiris unu el la kompanio.

— Songon, kredeble, malbonan ĝi ekvidis! — ekridis la alia.

— Kolombeto! — ĵus intencis voki ĝin la mastro, kiam ekbalanciĝis la tagmanĝa tablo... Lampo treege balanciĝis flanken... kandelingo falis de l' kartatablo...

— Tertremo! — ekkriegis iu el la kompanio. Kaj momente neniam homo estis en la ĉambro... Kiu tra pordoj, kiu tra fenestroj ĵetis sin ĉiuj sur la korton, kie infera koncerto surdigis nin... Furioza bleko de l' multenombraj en Ashabado hundoj, iela turmenta, ektimema bleko de l' bovinoj, la bleko de l' ŝafoj, — ĉio tio ĉi kunfluis kune... En la naturo do ĉio estis laŭ-antaŭe: tiel same pura kaj sennuba estis la mallumeblua ĉielo, tiel same kviete kaj klare lumis la luno, kaj facila venteto bruetis je l' folioj de la plej proksimaj akacioj; sed en tiu ĉi silento estis io malbonantaŭdiranta, io mistere-malluma.

Ni kune, ne povante kompreni, staris en la mezo de l' korto. La bestoj iom post iom komencis silentiĝi.

Jen kiel mia kapo sin turnis?... — tradiris s-ro L.

Kaj, efektive, en tiu ĉi sama momento mi eksentis la kapturon; la piedoj sin fleksis...


— Tio ĉi estas la dua ekbato!... Rigardu!... — ekkriis s-ro L., montrinte sur malfermitan fenestron. La lampo-fulmo ree rapide ekbalanciĝis, kaj al ni, eble, eĉ ekŝajnis nur, ke la tuta domo kvazaŭ fleksis flanken... Koncerto de l' hejmaj bestoj ekreĝis kun antaŭa forto...

Longe ni ankoraŭ staris sur la korto, iom post iom rekonsciigante kaj atendante ankoraŭ la trian ekbaton. Ĝi, tamen, ne sekvis. La ludantoj sin retiris por fini la kartludon, sed ni ekvolis vespermanĝi.

Ni eniris la ĉambrojn. La pigo, antaŭdirantino de l' tertremo, tiel same trankvile, kiel antaŭ ĝi, dormis sur la antaŭa loko, kvazaŭ nenio eĉ okazis aparta. Priparoladoj kaj disputoj rilate tiun ĉi okazon — pri antaŭdiro de beŝtoj la tertremon — longe ankoraŭ daŭris. Malgranda, apenaŭ vidata, luma strieto aperis sur la oriento, kiam ni reiradis hejmen, ankoraŭ pensante pri la travivitaj per ni impresoj...

Tradukis el unu rusa ĵurnalo

K. Boguŝeviĉ.




Vera vero.

Kaj tage kaj nokte la homoj disputas,
Ĉu homoj *malbone aŭ bone* kondukas.
Mi pensas do tamen en plennaiveco,
Ke ambaŭ estas supo de sama speco.

Ĉar se oni estas malbona
— Kaj ofte okazas ja tio —
Ni igas per nia konduto fripona
La sanktajn piulojn al far' de malpio.

Kaj se al bonulo bonfaro prosperas,
Ĝi kaŭzas, ke tuj malbonulo koleras;
Kaj unu do plimalbonigas alian:
Piul' malpiulon, malpia la pian.

Pi Du.



Pri la timo ĉe la infanoj kaj ĝia terapio.

(El la popole sciencaj artikoloj de Verdandi.)*

La sekvanta estas je la plej granda parto priparolado de l' rezultato de la esploroj, kiuj antaŭ kelkaj jaroj estis faritaj de la eminenta franca psikologiisto *Binet*.

Tiuj ĉi esploroj fariĝis parte per demandaj folietoj, kiuj estis disdonataj inter tre multaj lernejestroj, ilin plenigantaj. Poste ili estis prilaborataj parte per demandoj adresitaj al kelkaj konataj personoj nejunaj, havantaj sperton en la fako, parte per direktaj observoj je la propraj infanoj kaj ĉe tiuj de konatuloj. La demandaj folietoj enhavis naŭ demandojn, kaj pli ol cent plenigitaj folietoj el ses departementoj de Francujo povis esti prilaborataj.

Kompreneble la demando ne tuŝis la bonfonditan timon pro vera danĝero, kiu estas natura sento ĉe ĉiuj homoj, sed la superigitan timon pro imagita aŭ tute ne supozebla danĝero, kiu ofte ekzistas ĉe infanoj kaj ankaŭ iafoje troviĝas ĉe plenaĝaj personoj, povante ĉe ili pligrandiĝi ĝis vera malsano. Tio, kio eble plej multe dissignifas la du specojn, estas, ke la rajta timo pro vera danĝero levas la inteligenton kaj multigas la fizikajn fortojn, dum tia timo, pri kiu tie ĉi estas parolata, paralizas ambaŭ.

Se oni demandas la kaŭzojn kiuj entute povas timigi infanojn, ili estas kompreneble preskaŭ nekalkuleblaj. Tamen oni povas disigi kelkajn grupojn, kiuj plej facile klariĝas per ekzemploj. Unua kaj precipa estas *la mallumo*; malluma timo estas la plej tipa ĉe infanoj kaj, laŭ la envenintaj respondoj, tiom vastigita, ke apenaŭ iaj infanoj evitas ĝin. Ĝi estas la timo pro la nekonata. Oni demandas la infanon: kial vi timas? kaj la infano ne scias respondi. Al la sama grupo oni devas meti kelkajn aliajn specojn: timo pro la soleco, pro la fantomoj, la fulgisto, la friponulo, la lupo. Al alia grupo apartenas okazoj kiuj kaŭzas *fortajn sentajn impresojn*. Ekzemple paflegaj pafoj, la tondro, la grinco de korko.

Timo je tielaj aferoj estas pli ofta ĉe knabinoj ol ĉe knaboj. Ili kovras la orelojn, kvankam ili scias, ke nenia danĝero ekzistas. Alia grupo enhavas objektojn, kiuj kaŭzas *timon kune kun abomeno aŭ antipatio*: ratoj, vermoj, araneoj, sango, malvivulo k. t. p. Ankoraŭ alia grupo enhavas *troigitan timon pro ebula danĝero* ekzemple: renkonti malsobran personon aŭ almozulon sur la vojo, pro hundoj, ŝtelistoj. Unu knabino supozis, ke ŝi mortus, ĉar ŝi havis stomakajn turmentojn. Timo pro la morto tamen ŝajnas esti tre malofta ĉe infanoj. En la raportoj nur tri okazoj estis priparolataj. Fine oni havas grupon, en kiu la timo estas kaŭzita per *la memoro de terura okazo* ekzemple timo pro la akvo ĉar oni iam preskaŭ droniĝis.

Eksteraj signoj de timo.

Je tiu koncerno elvenis el la raportoj nenio nova krom tio, kion Darwin jam montris en sia verko pri la esprimo de la sentmovadoj ĉe la homoj kaj ĉe la bestoj. Krom penoj forkuri kaj serĉi ŝirmon, ili konsistas en krioj, paleco, tremo, kaj ofte (kio estas interesa) malpovo moviĝi; la terurigita infano kvazaŭ paralizigiĝas kaj mutiĝas.

La inteligento kaj fantazio de la timaj infanoj.

La inteligento de la timaj infanoj ĝenerale estas tiel ofte super kiel sub la mezo. Oni komprenas, ke se unuflanke kelkaj infanoj estas timaj, ĉar ili estas malsaĝaj, aliflanke povas okazi, ke aliaj estas tro malsaĝaj por timi. Kontraŭe montriĝis, ke plej ofte la timaj infanoj havas pli vivan fantazion ol ordinare. Tiu ĉi ne kaŭzas timon, sed grandigas ĝin, efikas, por tiel diri, resonantan fundon por la timo.

La aĝo kaj nombro de la timaj infanoj.

Ĝenerale oni povas diri, ke infanoj sub du jaroj, ne estas sufiĉe disvolvigitaj por timiĝi; tio ĉi okazas unue, kiam la tria jaro proksimiĝas. Tamen esceptoj ekzistas. La timo malgrandiĝas proksime al la 9--11 jaroj. Diri ilian procentan nombron el ĉiuj infanoj kompreneble estas tre danĝerume, ĉar nenia akra limo povas esti metata. La sciigoj en la respondoj diversiĝas inter 1 kaj 10 el 30 infanoj. Knabinoj pli ofte timiĝas ol knaboj, kio kredeble parte dependas de tio, ke virinoj ne tiom kiom viroj hontas montri timon. Malsanaj kaj malfortaj infanoj pli ofte timiĝas ol aliaj. La

* Verdandi estas Societo de studentoj, ĉe la universitato Upsala, por progresemaj ideoj.

malforteco parte havas direktan influon parte ĝi efikas per tio, ke la konscio pri la malforteco malgrandigas la memkonfidon.

La kaŭzoj de la timo.

La plej grava kaŭzo de la timo sendube estas *la povo de la ekzemplo*. La timo estas unu el la plej *infektemaj sentoj* de ĉiuj. Multaj instruistinoj unuvoĉe rakontas kiel ekzemple dum tondro ĉiuj infanoj turniĝas al la instruistino ne nur por serĉi helpon kaj ŝirmon sed por vidi, ĉu oni efektive devas timiĝi aŭ ne. Si sentas, ke, se ŝi estas trankvila, la infanoj tiel same estos kaj kontraŭe. Ekzistas du specoj de infekto. Unu speco estas transportita en la danĝera momento per gestoj, mienoj k. t. p. kaj plene estas epidemia; la alia estas eltenidita pli malrapide kaj maldirekte per interparoladoj kaj ekzemploj. Malgranda knabino, kiu antaŭe ne timis la mallumon, fariĝis timema, kiam ŝi dum 14 tagoj loĝis kune kun kolegino kiu timis la mallumon. Knabinoj, kiuj havas fratojn, timiĝas malpli ol tiuj, kiuj ne havas.

Alia kaŭzo estas *superekscitita fantazio*. Fantomaj kaj aliaj teruraj rakontoj k. t. p. kaŭzas sonĝojn kun krioj kaj ploroj dum la dormo. Malgranda knabino, kiu antaŭe ne timiĝis, komencis fari ĝin, kiam ŝi en la lernejo aŭskultis rakonton pri monstroj, aparte homoj kun ĉevalaj kapoj; ŝi en sekvo de tio suferis de premantaj sonĝoj dum kelkaj jaroj. Fantomaj rakontoj efikas malbonege.

Fine *malbona traktado* ludas gravan rolon inter la kaŭzoj de la timo. La respondoj rakontas, kiel multaj infanoj ĉiutage vidas ke la patro malbontraktas la patrinon en la hejmo. Tiuj infanoj havas malĝojan elvidon kaj ordinare timiĝas. Kelkaj instruistinoj rakontas, ke infanoj, kiuj ofte ricevas batadon en la hejmo, instinkte levas la brakojn super la kapo kiel defendo, se oni rapide proksimiĝas al ili. Aliaj, kiujn oni kutimas terurigi per la policisto, la malliberejo, la friponulo, la lupro, timiĝas ĉiufoje, kiam tiuj ĉi vortoj estas uzataj en la lernejo kiel ekzemploj.

La terapio de la timo.

La timo pli bone devas esti rigardata kiel malsano ol kiel morala difekto. Ne ĉiuj okazoj de la timo povas esti kuracitaj, sed la plej multaj. Tamen ofte longedaŭra terapio estas necesa. Kunlaboro inter la lernejo kaj la gepatroj necesiĝas; tiuj ĉi havas ofte la plej grandan influon. La terapio celas parte malestigi la komencon de la timo, parte kontraŭlabori ĝin tie kie ĝi jam ekzistas. Unue devas esti akcentita ekstreme grava regulo rilate unu rimedo, kiu *ne* devas esti uzata. Tie ĉi, kiel en la medicino, plej grave ofte estas forigi la uzadon de malutilaj rimedoj. La regulo estas: *neniam uzu korpan punon, minacojn aŭ mokon*. Se ekzemple infano ne volas eniri en malluman ĉambron aŭ iri pro kelka afero en la ĝardenon, post la mallumiĝo, oni neniam devigu ĝin, per minacoj, kaj ankoraŭ malpli per puno. Sed, bedaŭrinde, bestuma konduto ankoraŭ estas la metodo, kiun en tiuj kaj similaj okazoj uzadas la plej multaj gepatroj. La kaŭzoj ŝajne estas esence du. Korpan punon oni povas doni sen bezono sin ĝeni per meditado pri la kaŭzo de la difekto, kiun oni volas forigi. En la plej multaj okazoj oni estas bestuma pro spirita maldiligenteco se ne pro malscio aŭ malsaĝeco. La dua kaŭzo estas, ke la ekzistaĵo kiun oni punas ne povas sin defendi. Ifoje oni havas kontraŭ multaj el siaj kunvivuloj kolerajn sentojn, kiujn oni devas subpremi pro la simpla kaŭzo, ke ili estas personoj, kiuj povas rebati. Sed infano ne estas timinda — kaj en multaj okazoj la patro, sentanta sian nepuneblecon kaj certecon, batas la infanon.

Sed ne nur la perforto estas kondamninda, oni ankaŭ ne devas ridi je la timaj infanoj aŭ moki ilin — ankaŭ pri tio ĉiuj lernejestroj estis konsentaj. La kaŭzo estas, ke puno, minacoj kaj moko estas deprimantaj iloj, kiuj malgrandigas la moralan energion aparte ĉe malfortaj infanoj, sed ĉe la timo precize tiu ĉi morala energio, antaŭ ĉio, bezonas *esti plialtigita*. Nur ĉe fortaj infanoj, de fortega konstitucio oni povas pensi, ke korpa puno povus levi ilian spiritan energion, vekante sentojn de kolerio, rebelemeco, malamo, kaj ke moko elvokante ilian memamon povos grandigi iliajn animajn fortojn, sed tiu ĉi reakcio ne okazas ĉe malfortaj infanoj (timaj infanoj plej ofte estas malfortaj) kaj ankaŭ rilate la ceteraj la metodo estus el facile kompreneblaj kaŭzoj kondamninda. Aparte pri la korpa puno oni devas memori ke bestumeco naskas bestumecon.

Oni devas forigi la cirkonstancojn, kiuj elvokas timon ĉe la infano. Se ia regulo estas prudenta, tiu ĉi estas. Unue "la infekto" (vidu supre), la interparolado inter timaj infanoj, la malbonaj ekzemploj devas esti malhelpitaj; en multaj okazoj estas necese ŝanĝi ĉirkaŭaĵon. Estas plu klare, ke infanoj ne devas terurigi per fantaziaj kaj teruraj fabeloj (kiel oni bedaŭrinde ankoraŭ ofte uzadas).

Severaj ordonoj pri tio devas esti donataj al servantoj, amikoj kaj onkloroj.

Oni devas neniam sin kaŝi post pordoj k. t. p. por terurigi ilin; ankaŭ ne sentile elmeti ilin por terurigo per malsobraj personoj, malbonaj hundoj k. t. p. Plu oni devas gardi, ke ilia fantazio ne tro incitigas: oni devas ilin indulgi de fantomaj kaj teruraj rakontoj k. t. p.

Plu oni devas peni doni al la infano memkonfidecon. Oni devas ne nur peni, ke la timo ne ekvenu, oni ankaŭ malhelpu ke tiu ĉi restas kiel memoro aŭ opinio en la infana sento; oni devas peni, ke la infano ĉesu havi ian konscion pri sia timemeco. Kiam oni vidas la infanon preniĝi per la timo, oni devas tion ne montri. Oni ne peni devigi infanon konfesi, ke ĝi estas timema; estus granda eraro atentigi la infanon, ke ĝi tremas, ke ĝi ne havas aleston de animo k. t. p. unuvorte je la anima stato, kiun oni volas ekstermi. (Konfeso, kiuj estas ordonitaj en kelkaj religioj, povas esti bonaj por certaj celoj, sed koncerne la terapio *de la timo* ili estas decidite kondamnindaj.) Kontraŭe oni devas kun saĝo peni konvinki la infanon, ke ĝi ne havas timon, kaj fortigi ĝian kuraĝon per la konfideco, kiun oni al ĝi montras. Kun iom da sagaceco oni baldaŭ venos tiom longe, ke la infano ricevos okazon montri kuraĝon en cirkonstancoj, kiujn oni mem aranĝis en tiu ĉi intenco. Iom post iom oni povas efiki tion, kio estas la ĉefa afero, *progresaj ekzercadoj en kuraĝaj agadoj*. La ĉefa problemoj en tiu ĉi rilato estas iom post iom fari la infanon intima kun la objekto, kiu ekscitas ĝian timon. Tio ĉi ne devas fariĝi dum la timiĝo. Oni atendu, ĝis la infano estos trankvila, kaj agu kun granda singardemo kaj ekstrema dolĉeco. Necesaj kondiĉoj estas, ke oni antaŭe akiris ilian plenan konfidecon.

Oni alvoku ĝian prudenton, provu klarigi la kaŭzan ligon. En vera danĝero oni montru al la infano, kiel la timo paralizas la fortojn kaj malebligas batali kontraŭ la danĝero. En imagita danĝero oni trankvile klarigu la aferon, konvinku la infanon pri ĝia eraro kaj, se eble, lasu ĝin tuŝi la kaŭzon de la fantomo k. t. p. Sed ofte ne sufiĉas prudentaj klarigoj, oni devas alvoki la fortajn sentojn, memamon kaj ambicion, parolante pri kolegoj, kiuj montris kuraĝon k. t. p. La edukisto devas montri absolutan trankvilon ne nur en vortoj sed ankaŭ en sia konduto kaj sia ekzemplo, kiu efikas pli ol tio, kion ni diras.

Se infanoj timas nedanĝerajn bestojn, komence oni povas sin okupi per la bestoj en la alesto de la infanoj, ne aparte zorgante pri tiuj ĉi. Poste oni montras al ili la bestojn, prenas ilin per la mano, priskribas ilian naturon kaj kutimojn, igas dolĉe la infanojn ilin rigardi. Ĉe alia okazo ili povas ilin tuŝi k. t. p. La timo de mallumo estas malhelpata per tio, ke oni neniam parolas pri ĝi, sed ofte kondukas la infanon al mallumaj lokoj, komence tamen nur en preskaŭ-mallumo. Oni montru al ili kiel preskaŭ ĉio malgraŭ la manka lumo estas tiel kiel ordinare. Pli poste oni konduku ilin en pli mallumajn lokojn (koridoro, kelo k. t. p.), eliru kun ili en la kampon post la alveno de la mallumo (lasu sin surprizi de la mallumo dum ia promeno), distru la infanon, parolu pri aliaj aferoj. Iom post iom, kiam la infano fariĝis pli kuraĝa, oni ĝin sendas pro malgranda afero en la mallumo, akompanu ĝin komence duonvoje, laŭte parolante k. t. p. Almezuraj *ludoj* en la mallumo estas eminenta rimedo. La ĉefa kaŭzo de la mallum-timo estas la manko de sperto, kiel estas eble agi sen la vida sento. Blindaj personoj neniam timas la mallumon.


Ĉiam oni devas agi malrapide kaj singardeme, ke oni ne denove alvoku la timon anstataŭ kuraĝon.

Tiel oni prosperos en la plej multaj okazoj iom post iom liberigi la infanojn el la timo, kiu ne nur kaŭzas al ili pli grandan kvanton da sufero, ol oni eble supozas, sed ankaŭ en multaj okazoj estas la ĝermo de diversaj antaŭjuĝoj, superstiĉoj kaj aliaj spiritaĵoj malfortecoj ĉe la plenaĝa homo.

Verkis D:ro *Hjalmar Öhrvall*,

Laboratoro de fiziologio ĉe la Universitato Upsala.

El lingvo sveda tradukis **S. E. Krikortz**.



Nekredebla. — ... Dum teruriga tondrado, la tondro subite falis en mian ĉambron kaj *cindrigis* mian fratinton ...

— Kaj kion vi faris?

— Mi sonorigis al la ĉambristino kaj diris al ŝi: "Helena, *elbalau* la fraŭlinon."
(El la "Libro de l' Humoro" nun presata.)